

9

KRATAGO

Crataegus

 1986?

La nederlanda nomo (maja dorno) diras ĉion: *kratago* plej bone floras komence de majo.

Tiam ĝi estas kovrita per sennombraj blank-rozkoloraj floroj. Kratago estas simbolo de senkulpa, pura kaj fruktodona printempa amo. Tial florantaj kratagaj branĉoj estas deĉiame - en Eŭropaj landoj - donacitaj al junaj fianĉinoj. La arbo estas jes ja indiĝena en okcidenta Eŭropo. Keltoj konsideris ĝin sankta arbo, kiu ekestis de fulmo; haki kratagon alportis katastrofon.

Cetere en Francio la plej maljuna arbo estas ĝuste kratago el la tria jarcento post Kristo. Parolante pri Kristo la dornokrono, kiun li surhavis ĉe sia krucumo, laŭdire estis plektita el kratagaj branĉoj.

La ruĝaj beroj estas manĝeblaj kaj dum la unua mondmilito ili estis uzataj de germanoj kiel kafsurogatoj. La malmola ligno povas esti uzata por fari fortikajn malgrandajn objektojn. La ligno brulas rapide kaj eligas multe da varmo: ideala por panbakado!

www.josvertelt.nl



Ook in andere talen



Also in other languages



Ankaŭ en aliaj lingvoj

